



New Books

Order starred books from the B.E.A., others from the addresses given.

***Kredu min, sinjorino!** Cezaro Rossetti. Eldonita de Heroldo de Esperanto. Prezo 10ŝ. 6p., afr. 6p.

Jen libro, kiu ja plialtigas la nivelon de nia literaturo. Oni povas diri, ke ĝi estas tia grava originala verko, kia *Mondo kaj Koro*, *Viklimoj*, *Verdkata Testamento*, *Bakŝis*. Ĉi-foje ne temas pri poemaro, romano, aŭ novelaro, sed pri aŭtobiografio—kaj majstra aŭtobiografio, tia, kian oni povas kompari kun la senmorta verko de la Italo, Benvenuto Cellini, kiun, fakte, ĝi iomete similas, spirite kaj etose.

Cezaro Rossetti, kiu mortis subite lastan jaron, aĝa 48, estis Skoto de Svisa deveno. Laborante en Edinburga hotelo kiel kuiristo, li sentis enuon pri estre regata laboro en kondiĉoj karceraj, kaj forlasis ĝin por entrepreni la karieron de vaganta vendisto, komence ĉe dompordoj, poste en magazenoj kaj foiroj. Li sukcesis, materie kaj spirite, akirante sufiĉe da mono, kaj vastan mensan bildaron pri la ordinaraj homoj en Britujo de la periodo inter la du mondmilitoj. Liaj observoj kaj travivaĵoj, plejparte ridigaj, kelkfoje krudaj aŭ kortuŝaj, ĉiam instruaj, estas prezentitaj al ni pere de animo brava, sentema, humura, artiste honesta kaj sincera. La tuto estas vera regalo, kiu ricevus aprezon en nacia lingvo, kaj en nia kulturo nematura estas historia evento.

Dufoje la aŭtoro priskribas la esperantistojn, por iom tro akre moki iun provincan grupon, kaj, fine de la libro, por fari laŭdon al la Londona Klubo, kiun certe tiu unika societo meritis kaj meritas.

La lingvo estas flua, esprimplena, kaj viveca, malgraŭ ke pli zorga kribro estus foriginta kelkajn anglajn parolturnojn.

Multaj sentos inspiron pro la verko de Rossetti, sed samtempe nekapablon samrangi lian genion. Pale sonas la kliŝaj frazoj "Ekleginte, mi ne povis demeti la verkon", "Jen verko, kiun devas posedi ĉiu vera literaturamanto". Prave skribas Raymond Schwartz en sia enkonduko, ke la verko, same kiel bona vino, ne bezonas reklamon.

K. R. C. Sturmer.

*Naŭlingva Etimologia Leksikono.

Louis Bastien, 2nd edition, corrected and enlarged. 334 pp., 12/6, post 6p.

We congratulate the Esperanto Publishing Co. on bringing out this work. First published 40 years ago, it has long been out of print, but is still asked for. This edition is no mere reprint: the whole work, including the instructive preface, has been thoroughly revised, and the new OA roots have been added. The book is thus almost doubled in size, and greatly increased in value. Incidentally, it is well bound and excellently printed.

After every Esperanto root the author gives words in Latin, English, French, German, Italian, Portuguese, Spanish, and Russian, which contain the same root. We see, for example, that most Esperanto roots are common to all or nearly all these languages; while **bird**, **ĉifon**, **bedaŭr**, **ŝelk**, **nepre**, are found only in English, French, German, Polish, and Russian respectively. It must be noted that the work is not a dictionary. The national words given are not always